



Estrara Komunikado (EKO) 2016-2 sendita el Budapeŝto, la 26an de januaro. [Por tuja uzo kaj plia diskonigo](#)

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.

AMO-plena aliro al daŭripovo

Kiel elpensi ligojn inter Esperanto kaj la Daŭripovaj Evoluoj de Unuiĝintaj Nacioj? Jen la ĉeftemo de la 19a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO), okazanta en la skriba momento en Manaus, la ĉefurbo de Amazonio en la nordo de Brazilo. La temo estis traktita ne per prelegoj, sed per dinamika kuncerbumado (ideo-tempesto) por determini konvinkajn argumentojn por la prezento de Esperanto kiel bona rimedo por la plenumo de daŭripovaj celoj.

La seminario komenciĝis per kuna legado de la 17 daŭripovaj evoluaj celoj, kiuj aperis en la novembra revuo *Esperanto* sur paĝo 230. Poste en du grupoj oni laboris. Foje, respondoj evidentis, kiel ekzemple pri Edukado (celo 4) kaj Redukto de Socia Malegaleco (celo 10). Aliaj estis pli defiaj, ekzemple celo 6. Kiel Esperanto povas helpi en la protektado de akvo? Unu respondo: akvo-protektado postulas la protekton de arbaroj (celo 15). Se Esperanto estos uzata por internacia komunikado oni ŝparos multe da paperoj ĉe Internaciaj Organizaĵoj, ĉar oni ne bezonas publikigi multajn dokumentojn en tiom multe da lingvoj. Ĝuste tio estis la intenco de la aktivaĵo: stimuli homojn interplekti la daŭripovajn celojn kun Esperanto kaj eviti la kutiman tendencon trakti lingvajn problemojn aparte de la aliaj problemoj de la mondo.



da diskutoj kaj laborado.

La diskutado estis riĉenhava, kun plano skribi post la seminario dokumenton kun la ĉefaj argumentoj por ĉiu celo. Sekvas en la seminario du pliaj tagoj

[Koncizigo de raporto de Alvaro Borges de Almeida Motta](#)

Sekvoj de AMO

AMO 18: Alkroĉitaj la rekomendoj aŭ konkludoj el tiu seminario en Slovakio pri turismo, pri kies komenco ni raportis en EKO 2016-1.

AMO 20: Okazos en Katmanduo, Nepalo (27-29 feb.) Gvidontoj estos Hori Yasuo (JP), Bharat Ghimire (NP), 'Trezoro' Huang Yinbao (CN) kaj Stefan MacGill (HU). Proponata temo: Kultura klerigado.

AMO 21 okazos en Bandung, Indonezio (24-28 mar) kadre de la Trilanda Kongreso por Indonezio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Temo: Instrustrategioj konvenaj por Azio kaj Oceanio. Gvidontoj: Lee Jungkee (KR), d-ro Markus Gábor (HU), Stefan MacGill (HU) kaj pliaj el la kongresa landotrio.

Ekde EKO 22 la seminaria serio venos sub la respondecon de la nova komisiito, d-rino Sara Spanò. La sekva seminario (**AMO 22**) okazos paralele kun AMO 21, kadre de IJF en Pesaro, Italio, kun la celo interalie trejni trejnistojn. Tuj poste sekvos seminario en Ürgüp (**AMO 23**), en sudorienta Turkio. Poste en aprilo (16-17) okazos ĵus organizita konciza seminario (**AMO 24**) kadre de la dana jar-kongreso en Odense. Tio konsistos el FLAM-analizo pri la skandinavia movado kaj diskuto kiel efike marki jubileojn (vidu konkretan ekzemplon sube).

Pliaj seminarioj estas konsentitaj kaj ankoraŭ pliaj estas je la stadio de proponado. Malcertas, kiu lando ĝuos la rajton okazigi la 25an seminarion.

KER-ekzamenoj en Francio la 16an de aprilo 2016 kaj stud-periodo

Jannick Huet-Schumann (estrino) kaj Christophe Chazarein (ekzamen-responsulo) atendas vin en **kastelo Grésillon** (Francio) **de la 8a ĝis la 16a de aprilo 2016** por la **6a PRINTEMPAs** kun tri kursoj: por komencantoj kun Marion, por prepari la ekzamenon B1 kun Christophe, kun Radojica Petrovic (ILEI-estrarano) por B2 kaj C1. Vidu <http://gresillon.org/printempo> kaj aliĝu nun por havi rabaton: <http://gresillon.org/aligho>

Nova retejo de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA):

Gravegas, ke la Landaj kaj Fakaj Asocioj havu modernajn kaj regule prizorgatajn retejojn, en minimume du lingvoj. Jen bonvena aldono al la faka uzado de nia lingvo: <http://umea.fontoj.net>. Demandoj, komentoj kaj gratuloj iru al d-ro Christoph Klawe, prezidanto de UMEA (umea@uea.org)

Centjara datreveno de la morto de Zamenhof

Tio okazos la 14an de aprilo 2017. Ni alvokas Landajn kaj Fakajn Asociojn prepari sin iel marki la tagon. Ni petas Komitatanojn ligi sin al tiuj planoj. Kun preparperiodo de 15 monatoj neniel estas tro frue komenci la planadon. Inter la ideoj: Ceremonietoj en Zamenhof-stratoj; Mencio de la mortotago ĉe radiostacioj (multaj mencias memortagojn); Gazetara Kampanjo; Eluzo de sociaj retejoj (*Google-Doodle* kma.)

Pri la Landaj Asocioj de UEA en 2014

Gravegas intensigi la rilatojn inter UEA internacie kaj je landa nivelo. La EKO-komuniko, lanĉitaj en 2013, liveris al la Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne) regulajn (praktike ĉiusemajnajn) informojn pri la internacia vivo kaj foje landnivelaj esploroj kaj rekomendoj. La dua etapo estas intensigi la kontribuojn de Landaj Asocioj al niaj internaciaj laboroj, kie laborfortoj kritike malmultas. Cele al tio, ni en 2014 dissendis enketilon por arigi aŭ konfirmi bazajn informojn kaj akiri novajn informojn pri tre difinitaj kampoj (retejoj, asociaj historioj, vikipedio, ĝemelurboj, rilatoj kun Unesko kaj enlanda faka agado). Post longe paŭzo – kaŭzita pro la aludita manko de homaj rimedoj – ni finfine povas vidigi la rezultojn. Pri la plimulto de la prokrasto plene kulpas la subskribinto, pro naiva mistakso de la propraj fortoj. Septembre ni enŝaltis la efektivan plenuminton: s-ron Uriel Guardián el Nikaragvo. Kun profunda danko al li, ni enmanigas la rezulton en la formo de alkroĉita 55-paĝa PDF-dokumento.

smg

Vortoj: 805

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...